

# THE BRITISH ESPERANTIST

*The Official Organ of The British Esperanto Association.*

VOL. I.—No. 12.

DECEMBER, 1905.

[PRICE ONE PENNY.  
POST FREE, 1½d.

## AL NIAJ LEGANTOJ.

Ĉe la eldono de tiu ĉi numero, ni atingas la finon de nia unua jara volumo. Estas konvena okazo por reen rigardadi—kaj antaŭen.

Kore ni dankas al ĉiuj, kiuj subtenis nian Asocion kaj nian Jurnalon per abonoj—precipe akurate pagitaj—monoferoj, laboroj, sagaj konsiloj, artikoloj kaj aliaj sendoj, k.t.p.; eĉ se iu malhelpis al ni kun sincera intenco nur helpi, al tiu ankaŭ ni kore dankas pro lia bonega intenco. Ĉar, helpante nin, oni sendube antaŭpuĝas la komunan aferon Esperantistan, kiun ni ĉiuj tiel varme amegas.

Ĉu nia afero progresadis dum la lastaj dek du monatoj? Jes! sen ombreto de dabo. Ĉiam plimulte kreskadas la regiono de Esperantistujo, ĉiam pli rapide kreskas la nombro de la aligintoj, ĉiam pliboniĝas la stilo de la verkantoj, la flueco de la parolantoj. Jam komencis la publikaj korporacioj akcepti la Lingvon, tre singardeme en la unua tempo, sed—ĉiam ni esperas, ĉiam laboras, kaj fine nia Afero venkos.

La plej ĉefa fakto de la pasinta jaro estas la Boulogne'a Kongreso. Tiuj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povis ĉeesti en ĝi ne povas plene kompreni, kial ĝi influis sur la ĉeestintoj kun tiel frapante inspira efiko. Sed la fakto restas. Gi devenas el diversaj kaŭzoj. Figuru al vi dum unu momento, kio povus esti la stato de aferoj se anstataŭ nia kara Majstro ni havus kiel estro de nia afero ian fieran avaran, jal-

## TO OUR READERS.

With the issue of this number we reach the end of our first yearly volume. It is a suitable occasion for looking backwards—and forward.

Heartily we thank all those who have supported our Association and our Journal with subscriptions—especially when promptly paid—donations, work, wise counsel, articles and other contributions, &c.; even if anyone has hindered with the sincere intention of helping, we heartily thank him, too, for his excellent intention. For those who assist us undoubtedly forward the common interest of Esperanto which we all have so deeply at heart.

Has our affair made progress in the past twelve months? Yes, past all shadow of a doubt. Ever a larger growth to the territory of Esperantoland; ever a faster increase in the number of adherents; ever an improvement in the style of those who write and in the fluency of those who speak. Public bodies have already commenced to accept the Language, very cautiously at the outset, but—we hope always, work always, and in the end our cause will triumph.

The most salient fact of the past year is the Congress at Boulogne. Those who for various reasons were unable to be present there cannot comprehend why its influence on those who were present had such an astonishingly inspiring effect. But the fact remains. It arises from various causes. Imagine for one moment what might have been the state of affairs if, instead of our dear Master, we had had as leader some proud, grasping, jealous, turbulent despot, boastful of his learning, anxious about personal profit,

zan, malpaceman tiranon, kiu fanfaronadus pri sia instruiteco, zorgus pri siaj gajnoj, rifuzus honoron al siaj ne-Esperantistaj antaŭuloj, intrigus per la reciprokaj envioj de malnobla ia sekvantaro kaj altrudus sur ĝin, vole-nevole, aron da senpripensaj malsagaj kondiĉoj. Figuru, kio estus, se ĉiu persono, ĉiu naciano estus alveninta al la Kongreso preta nur por plialtigi sin kaj sian nacion, nur por malaltigi siajn kunulojn, humiliigi aliajn naciojn, mal-kompreni ĉiujn, paroli pri siaj rajtoj kaj la devoj de aliaj, perforte altrudi siajn opiniojn. Tia kongreso nepre kaj tuje ruinigus la Lingvon, eble semus la elementojn de tutmonda malpaciĝado. Sed nun prezantu al vi ĉion kio estas la preciza malo de tio, kaj vi havos antaŭ viaj animaj okuloj la verajn kaŭzojn de la nepriskribebla prospero atingita en Boulogne. Ni kuragigu, esperante eĉ pli grandan sukceson en la estonteco.

Alproksimiĝas jam la festena kristnaska tempo. Por multaj el niaj amikoj ĝi estas sezono de frosto kaj neĝo. Sed Esperantistujo estas mond-vasta, kaj multaj el nia aro, logante sub suda suno, sapiroj vane por mal-granda peceto da glacio, eĉ por mal-varmeta venteto. Al ĉiuj kaj al ĉiu nisendas niajn fratajn salutojn. Al la gajemaj ni deziras gajecon, al la mal-gajaj ni esprimas nian simpatian. Ni ne povas forgesi, ke kelkaj logadas meze de terurajoj, pri kiuj pli detale tie ĉi paroli estus vane kaj nekonvene. Baldaŭ alvenu la ĉeso de interhoma malamo el kiu devenas malbono; baldaŭ estu disvastigita la spirito de amo kaj paco, kiujn subteni kaj antaŭenpuŝi nia Lingvo precipe celas. **ESPERANTISTOJ ĈIEAJ, AKCEPTU NI PETAS, NIAJN KORAJN BONDEZIROJN.**

refusing to honour his non-Esperantist predecessors, playing upon the mutual jealousies of some base clique of followers and imposing on them, whether they would or no, a code of ill-conceived, foolish conditions. Imagine what it would be if each individual, each member of a nation, had come to the Congress only ready to benefit himself and exalt his nation, prepared but to belittle his comrades, to point scorn at other nations, to misunderstand everybody, to discourse on his own rights and other people's duties, to thrust forward his own opinions. Such a Congress would inevitably and speedily have ruined the Language, perhaps have sown the seed of world-wide disorder. But now realise in your mind everything as the exact reverse of all that, and you will picture to yourselves the true causes of the indescribable success which was attained at Boulogne. Let us take courage, and hope for even greater things in the future.

Even now the festive season of Christmas draws near. For many of our friends it is a time of frost and snow. But Esperantoland is world-wide, and many of our circle, living under southern skies, will vainly long for a small piece of ice, or even for a cool breeze. To all and each we send our brotherly greetings. To the gay we wish gaiety, to the sad we send our sympathy. We cannot forget that some are living surrounded by scenes of terror, to enlarge upon which here would be useless and out of place. May the time arrive soon when the mutual hatred of men shall cease with its attendant evils; when shall be spread abroad the spirit of love and peace, to uphold and forward which is the main object of our Language. **ESPERANTISTS EVERYWHERE, PLEASE ACCEPT OUR HEARTY GOOD WISHES.**

### NE TIMU SED ANTAŬEN!

En la lasta tempo niaj legantoj kredeble rimarkis kaj eble tralegis kelkajn pli-malpli akrajn artikoletojn pri la gramatikaj vortoj "imperativo" kaj "subjunktivo." Respondante al unu amiko nia, kiu maltrankviligis pro la malpaco eble elvenonta el tiaj artikoloj, D-ro. ZAMENHOF diris: "La disputado pri la nomoj subjunktivo kaj imperativo sajnas al mi tute superflua—tamen mi trovas ĝin ankaŭ sendanĝera."

## GRAVA AVIZO.

Estas decidite, post konsiliado inter la Estraro de la BRITA ESPERANTISTA ASOCIO kaj S-ro. H. B. Mudie, pose-danto-redaktoro de THE ESPERANTIST, ke alvenis la konvena okazo por unuiga la du gazetojn. Tio do fariĝos, komen-cante de nia Januara numero. Aperos tiam sur nia kovrilo la titoloj de ambaŭ gazetoj, kaj THE BRITISH ESPERANTIST ekpligrandigos, samtempe amplekse kaj preze.

La paĝa formato estos tia sama kiel ĝis nun, sed la presa formato tre ekvastigos. La nombro da paĝoj estos pligrandigita ĝis 20, el kiuj 8 havos la formon de literatura aldono.

La kosto estos 3 pencoj por ekzemplero, jara abono 3 ŝilingoj afankite (4 frankoj, 1½ rubloj, 75 cendoj). Por oportuno de tiuj amikoj, kiuj okupas sin pri propagandado, oni povos ricevi ekzemplerojn sen Aldono po 1 penco (1½p. afankite) aŭ 1s. 6p. por unu jaro afankite.

S-ro. MUDIE komplete konsentis aligi al nia Redaktora Komitato. Dum plimulte ol du jaroj li oferadis mala-vare sian liberan tempon pro kaj por THE ESPERANTIST; kaj el nia propra sperto ni povas atesti, ke la laboro rilatanta tian entreprenon estas multe pli granda ol povus supozи la ekstera publiko.

Kiam THE ESPERANTIST ekkomen-cigis, ekzistis nenia oficiala organo por anglolingvaj Esperantistoj, kies nombro estis tre malgranda. Nur malofte, en tiu tempo, oni aludis Esperanton en la publikaj gazetaroj sen malestimo; la ĝeneralaj sintenadoj de la publiko estis mokema, kaj ni Esperantistoj nepre devis akcepti ĝin bone kiel pli favoran por la Afero ol indiferente. Kuraĝa koro estis bezonata por deiri sur la arenon kaj bataladi por malsatata afero. Tia koro apartenas al S-ro. MUDIE.

Sed ankoraŭ ne estas finita la batalado. Kvankam foje kaj ree venas la ekkrio "Trafite! vere, jes, trafite!" malproksima tamen ankoraŭ aperas la tempo kiam ekstarigas la tutaj rigardantaroj, kaj sonoros la tutaj teatroj per ĝojebla aplaŭdado. Tiam, kiel en la antikvaj tempoj, niaj ellacigitaj gladiatorioj, puriginte siajn glavojn,

## IMPORTANT NOTICE.

It has been decided, in consultation between the Council of the BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION and Mr. H. B. Mudie, proprietor-editor of THE ESPERANTIST, that the time has come for the union of the two gazettes. This will accordingly be done, commencing with our January issue. The titles of both papers will then appear upon our cover, and THE BRITISH ESPERANTIST will be increased both in size and price.

The size of the page will be as hitherto, but the amount of printed matter upon each page will be greatly increased. The number of pages will be increased to 20, of which 8 will be in the form of a literary supplement.

The price will be 3d. per copy, or 3 shillings per annum, post free. For the convenience of those friends who occupy themselves with propaganda, copies will be obtainable, without supplement, at 1d. (1½d. post free), or 1s. 6d. per annum, post free.

Mr. MUDIE has kindly consented to join our Editorial Committee. For more than two years he has ungrudgingly sacrificed his leisure for the sake of THE ESPERANTIST, and we can testify from our own experience that the work connected with such an undertaking is far greater than would be supposed by the outside public.

When THE ESPERANTIST commenced its career, there was no official organ for English-speaking Esperantists, and the number of these was very small. Seldom in those days was Esperanto mentioned in the public Press without scorn; the general attitude of the public was ridicule, which we Esperantists perforce welcomed as being more favourable to the Cause than indifference. It needed a brave heart to descend into the arena and to fight for an unpopular cause. Such a heart has Mr. MUDIE.

But not yet is the battle ended. Although from time to time comes the cry: "A hit! a palpable hit!" still the time seems far off when the whole of the spectators shall rise to their feet and the theatre shall ring with rapturous applause. Then our worn-out gladiators, as in the olden days, will wipe their swords and

reiros hejmen por morti; kaj disiĝos la observantaro por fanfaronadi pri sia triumfo!

Leganto, ĉu vi volas subteni niajn probatalantojn, aŭ ĉu vi preferas, post ilia foriro, fanfaronadi?

## NOVAJ MEMBROJ DE LA B.E.A.

JOHN FIELDING, *Lewisham*; ALFRED GRIFFIN, *St. Helens*; T. BRUCE DILKS, B.A., *Bridgwater*; E. W. FRENCH, *Saranac Lake, N.Y., U.S.A.*; No. 170, anonyma, laudeziro; C. MCPHERSON, *Cambridge*; Pastro F. E. MIDDLETON, *Blackheath Hill*; W. PEPPER, *Derby*; Arhdiak. G. R. WYNN, D.D., *Limerick*; W. TONER, *Rutherglen*; W. PHILLIMORE, *Wandsworth*; C. SLATER, *Higher Openshaw*; Kapit. W. MEYER-GRIFFITH, *Upper Deal*; H. CROXFORD, *Barnes*; J. C. BEAUMONT, *Leeds*; S. H. FARNES, *Leytonstone*; F-ino. L. SUTCLIFFE, *Bridgwater*.

Nomoj gis nun ellasitaj:—A. T. MADING, *Oxford*; Kapit. E. MAIRIES, *Plymouth*; S. MAITLAND, *W. London*; F-ino. E. S. MUIR, *Edinburgh*; F-ino. M. MACE, *Edinburgh*.

## NOVA FRATULO.

CLARENCE BICKNELL, *Bordighera*.

## DIPLOMITOJ.

C. W. T. REEVE, *Camberwell*; J. W. MC AVAY, *Warrington*; F. L. G. MARÉCHAL, B.A., *Leeds*; F-ino. M. E. COWPER, *Bovey Tracey*.

## KOLEGOJ.

F-ino. M. L. JONES, F-ino. J. ROBERTSON, F-ino. M. HUGHES, F-ino. H. H. JONES, Dr. SYDNEY WHITAKER, W. VILLAGE, *Liverpool*; A. GRIFFIN, *St. Helens*.

## DONATIONS.

	£	s.	d.
Maj.-Gen. GEORGE COX, <i>London</i> ..	1	1	0
JOHN FOGG TWOMBLEY, Esq., Brookline, Mass. ..	1	0	0
E. DAWSON ROGERS, Finchley, N. (for journal) .. .. ..	1	1	0

## NOTICES.

A title-page and index to the first volume of THE BRITISH ESPERANTIST will be issued in January.

Those subscribers whose subscriptions expire with this number are requested to renew them with the least possible delay.

Many of our readers will be pleased to see that the price of the English-Esperanto Dictionary by Messrs. O'Connor and Hayes has been reduced to 1s. 8d., post free.

go home to die, and the spectators will disperse to boast of the victory as their own!

Reader, will you support our fighters, or will you do the boasting when they have departed?

## KONSILANTARO.

La 13an de Novembro okazis kunsido de la Konsilantaro, kiam gravaj aferoj priparoligis. Interalie oni decidis principe pri la kuniĝo de *The Esperantist* kun nia oficiala gazeto, kaj lasis la detalojn al la Gazeta Komitato. Aliloke la legantaro trovos la decidojn de l' dirita Komitato.

La kasisto povis fari kontentigan raporton pri la financoj de la Asocio.

La Librovenda Komitato raportis ke, laŭ instrukcioj, ĝi presigis du novajn afișojn pri Esperanto, unu grandan kaj unu malgrandan. La grandajn oni vendos al la grupoj po unu penco kaj la malgrandaj estos ĝenerale disdonataj senpage al la librovendistoj. La sama komitato raportis ankaŭ pri siaj klopoj por sia reprezentigo ĉe anoncagento, ankaŭ pri proponata modelo de Esperantista stelo, k.c.

S-ro. Clarence Bicknell, la konata verkisto, estis elektita unuanime kaj aklime, kiel Fratulo de la B.E.A.

Sinjoroj Buchanan (Glasgow) kaj H. F. Höveler (Londono), estas petitaj aligi al la Cenzura Komitato por la ekzamenado de la libroj proponataj al la Asocio por ĝia aprobo kaj eldonado.

Diversaj verkaj submetiĝis, nome: *Fajrkutimoj*, de S-ro. Southcombe (Bournemouth). Aprobita kaj rekomendita por esti eldonita de la Asocio.

*Esperantaj Lecionoj por la "Self-Educator" de Harnsworth*, verkitaj de S-ro. H. Clegg. Aprobataj.

*Esperanta Stenografo, laŭ la sistemo de Pitman*, verkitaj de S-ro. Lyndridge (skribita per skribmaŝino), k.c. Aprobata.

Kelkaj aliaj verkoj estas transdonitaj al la Cenzura Komitato.

S. NICHOLL, Hon. Sek.

## KRONIKO.

**Deal.** — Vintra kurso komencita. Lernkunveno ĉiuvendrede, je la okdekvin, en Comber College. Aparta kurso por novaj rekrutoj; kaj, samtempa, legado kaj konversacio por la pliadepoj. Oni kantas hore ĉe ĉiukunveno. Baldaŭ, dua kurso komenciĝos en St. George's Hall, kredeble ĉiujade. La klubo kreskas.

**Battersea.** — Kelkaj anoj de tiu ĉi grupo kunvenas ĉiumarde en la "Oriental Kafejo," Lavender-hill, de 7.30 ĝis la 10a. Tiu ĉi estas nur por interparoladi; la vendreda kurso estas, kiel kutime, ĉe la Latchmere Baths.

**Kingston-on-Thames.** — Tiu ĉi grupo komencis sian duan kurson ĉe "Park Lodge," Fairfield West, Oktobro 10an. Bedaŭrinde la nombro da ĉeestantoj estis malgranda, sed ĉiuj estis tre entuziasmaj. Tamen sendube la grupo pliĝos kiam la sciado pri la nova lingva societo disvastiĝos en la urbo. Sinjoroj en la ĉirkaŭaĵo, kiuj deziras kuniĝi estas invitataj sin turni al S-ro. F. M. Sexton ĉe la suprecitita adreso. Novaj membroj ricevos koran akcepton. La grupo aligos al la B.E.A. kiel eble plej baldaŭ.

**Shrewsbury'a Esperanto Klubo.** — Merkredon, la 25an de Oktobro, okazis la unua publika kunyeno de tiu ĉi klubo en la "Muzikhalo." Pro la neevitebla foresto de la Urbestro (S-ro. Hearne), kiu intencis prezidi, S-ro. Foulger prezentis la paroladonton, D-ro. R. J. Lloyd, M.A., el Liverpool'a Universitato. La parolado, titolita "Kial ĉiuj homoj devus lerni Esperanton," tre amuzis kaj interesis la multajn aŭskultantojn, el kiuj kelkaj petis de la sekretario pluajn sciigojn pri lia tiea klubo. Ni esperu, ke la rezultatoj de ĉi tiu kunveno estos indaj je liaj penadoj por triumfi en Shrewsbury. La sekretario estas S-ro. A. J. Hulme, White Studios, Castle-street. La kurso komenciĝis en la nova klubejo, en Castle-street, la 14an de Novembro.

**Gardena Urbo.** — Ĉe kunveno, la 5an de Oktobro, estis decidite fondi groupon por lernado de Esperanto.

## CHRONICLE.

**Deal.** — Winter course commenced. Class-meeting every Friday, 8.15 p.m., at Comber College. Elementary class for new recruits, as well as reading and conversation for the more adept. Esperanto chorus-singing is a feature of every meeting. Shortly, an additional course will commence at St. George's Hall, probably on Thursdays. The club is increasing in numbers.

**Battersea.** — Several members of this group meet on Tuesdays at the "Oriental Café," Lavender-hill, from 7.30 till 10. This is only for conversation; the Friday class is, as usual, at the Latchmere Baths.

**Kingston-on-Thames.** — This group commenced its second course at "Park Lodge," Fairfield West, on October 10th. Unfortunately, the number of those present was small, but all were very enthusiastic. However, no doubt the group will increase when the knowledge of this new linguistic society becomes spread abroad in the town. Gentlemen in the neighbourhood who wish to join are invited to apply to Mr. F. M. Sexton, at the address mentioned above. New members will receive a hearty welcome. The group will join the B.E.A. as soon as possible.

**Shrewsbury Esperanto Club.** — On Wednesday, the 25th October, the first public meeting of this club occurred in the "Music Hall." Owing to the unavoidable absence of the Mayor (Mr. Hearne) who intended to preside, Mr. Foulger presented the speaker, Dr. R. J. Lloyd, M.A., of the Liverpool University. The address, entitled "Why All Men Should Learn Esperanto," much amused and interested the many listeners, some of whom asked the secretary for further information as to the club. Let us hope that the results of this meeting will be worthy of his endeavours to triumph in Shrewsbury. The secretary is Mr. A. J. Hulme, White Studios, Castle-street. The course commenced at the new club-room, Castle Chambers, on November 14.

**Garden City.** — At a meeting on the 5th of October, it was decided to found a group for learning Esperanto.

Per influo de S-ro. Dudeney (hon. sekretario de la Bedford'a Grupo), D-ro. Snape ĉeestis kaj plene atestis pri la utilaco de tiu ĉi lingvo, kaj parolis pri sia antaŭnelonge faritaj vizitoj al Boulogne kaj Parizo. Oni invitis S-ron. Ebenezer Howard (Gardena Urbo) prezidi je proksima kunveno. La sekretariino estas S-ino. F. Rogers (The Chalet, near Norton), kiu esperas aligi la grupeton al la B.E.A. kiam ĝi fariĝos sufice fortaj.

**Stoke Newington.** — Nova kurso komencis en Oktobro ĉe la Co-operative Brotherhood Trust, 37, Newington Green-road, London, N., ĉiujaŭde vespero je 8.15. La profesoroj estas S-roj G. M. Hollis kaj P. D. Hugon (profesoro aprobita). Por informoj, oni sin turnu al la sekretario, kiel supre.

**Thomas Binney Institute** (*Thomas-street, London, W.*). — La kurso farita la lastan jaron de S-ro. S. Nicholl, sekretario de B.E.A., estas rekomenita ĉiumerkrede vespero, je 8.30, de S-ro. P. D. Hugon. La kurso estas senpaga por la membroj de la Instituto. Oni sin turnu al la sekretario.

**Limerick.** — Je vendredo, la 10a de Novembro, Ĉefdiakono G. R. Wynne, D.D., Parohestro de S-to. Michael en ĉi tiu urbo, faris paroladon pri la internacia lingvo. Ĉirkaŭ cent gejunuloj ĉeestis. La temo estis absolute nova, kaj granda intereso elmontriĝis. La fondo de grupo en la urbo baldaŭ sekvos.

**Montevideo.** — Nova grupo fondiĝis, en tiu ĉi malproksima urbo, la 24an de Septembro. La prezidanto estas S-ro. Carlos Charrier, la kasisto S-ro. E. M. Martin, kaj la sekretario S-ro. Rafael Favaro. La B.E.A. sendas sincerajn bondezirojn kaj esperas por la nova grupo, grandan kaj rapidan sukceson. Adreso, Calle 25 de Mayo, 280.

**Openshaw.** — La kurso de tiu ĉi grupo, kiu konsistas el dekduo da lernantoj, komencigis je la fino de Aŭgusto. La kursejo estas en la Lernčambro, Clement's-street, kaj la kunsidhoro estas la 8a vespero. Oni esperas, per la kunhelpo de la Sale'a Grupo, fondi centran societon en Mančestro. La kotizajo de kurso estas tre malalta (enkonduka pago 6p.

Through the influence of Mr. Dudeney (hon. secretary of the Bedford Group), Dr. Snape was present, and gave ample testimony to the usefulness of this language, and spoke about his recently-made visits to Boulogne and Paris. Mr. Ebenezer Howard was invited to preside at the succeeding meeting. The lady secretary is Mrs. F. Rogers (The Chalet, near Norton), who hopes to unite the little group to the B.E.A. when it becomes strong enough.

**Stoke Newington.** — A new course was started in October at the Co-operative Brotherhood Trust, 37, Newington-green-road, London, N., every Thursday, at 8.15 p.m. The teachers are Mr. G. M. Hollis and Mr. P. D. Hugon (profesoro aprobita). For particulars, apply to the secretary, as above.

**Thomas Binney Institute** (*Thomas-street, London, W.*). — The class held last year by Mr. S. Nicholl, hon. secretary, B.E.A., was started again on Wednesday evenings, at 8.30, by Mr. P. D. Hugon. The course is free to members of the Institute. Apply to the secretary.

**Limerick.** — On Friday, the 10th November, Archdeacon G. R. Wynne, D.D., Rector of St. Michael's, in this city, delivered a lecture on the international language. About a hundred young people were present. The subject was entirely new, and much interest was exhibited. The formation of a group in the city will shortly follow.

**Montevideo.** — A new group was founded in this far-away town on the 24th September. The president is Señor Carlos Charrier, the treasurer Señor E. M. Martin, and the secretary Señor Rafael Favaro. The B.E.A. sends sincere good wishes, and hopes the new group will have great and rapid success. Address, Calle 25 de Mayo, 280.

**Openshaw.** — This group's class, which consists of a dozen students, commenced at the end of August. The class is held in the schoolroom, Clement's-street, and the time of meeting is 8 p.m. It is hoped, by the aid of the Sale Group, to found a Central Society in Manchester. The class-fee is very low (entrance-fee 6d., and 4d. per month after), as it is only desired to cover the

kaj poste 4p. ĉiujonate) ĉar nur estas dezirate ebligi pagon de 1' elspezoj.

**Wellington, Shropshire.** — Vendredon, Novembro 10an, ĉe la Christ Church Men's Club, S-ro. A. J. Hulme, el Shrewsbury, faris paroladon titolitan "Esperanto: kreskiganta potenco." La paroladanto traktis pri la ideo de komuna esprimilo inter nacioj, kaj mallonge pridiris kelkajn provojn por plenumi ĝian mankon. Li parolis pri ĝeneralaj alprenoj de Esperanto, ĝia disvastiĝo, ĝia literaturo, k.t.p., kaj klarigis kontraste ĝian logikan konstruon kontraŭ tiu de la angla. La parolanto estis varme aplaudita kaj oni esprimis la esperon ke li baldaŭ ripetas sian visiton.

**Plymouth.** — La ĉeestantoj je la lasta kunveno, la 1an de Novembro, estis tre malmultaj pro la malbonega vetero kaj la urbaj elektoj. La ĉiusemajnaj kunvenoj, tamen, estas ĉiam vizitataj de multaj lernantoj. La ideo pri kunvenado en ĉies domo laŭvice bonege sukcesas, ĉar la grupo jam varbis dek ses novajn anojn, kaj nun ĝi provas tian saman metodon en Devonport, kie S-ro. Hawkyard bonvolis entrepreni la kursojn. La jenaj Plymouth'aj grupanoj faras kursojn senpage:—

MR. J. HAWKYARD, St. George's House, Devonport; MR. C. LEE, Y.M.C.A., Devonport; MR. D. SEARLE, 10, Hillpark crescent, Plymouth; MISS L. HOLT, 13, Connaught avenue, Plymouth. MR. J. THILL, 6, Barton-crescent, Plymouth.

**Leeds.** — Tiu ĉi grupo ekfaris kursojn kie oni instruas pri Esperanto laŭ la Gouin'a metodo kiun la lernantoj multe ŝatas. La komitato intencas aranĝi por festo, koncertoj, kaj baloj, kaj ankaŭ por eksposizio en la Norda Instituto. S-ro. F. L. G. Maréchal, B.A., faris paroladojn en Pudsey kaj Batley, kaj, kiel rezultato, grupo estas fondita en ambaŭ urboj. La kursoj suprecititaj okazas ĉiu ĵaŭde de 7.30 ĝis 9.30 pri kiuj la sekretario (S-ro. J. H. Beaumont, 19, Leathley-road, Hunslet) plezure liveros plenan sciigon.

**Londona Klubo.** — Je vendredo, la 20a de Oktobro, ĉia klubo havis la grandan plezuron akcepti S-rin. Bellan, sindikon de Urbo Parizo, kiu afable alvenis je la invito de la klubo. S-ro. Harald Clegg faris paroladeton en Esperanto dirante. "La anoj de la

expenses. The secretary is Mr. C. Slater, 61, Ackroyd-street.

**Wellington, Shropshire.** — On Friday, the 10th November, at the Christ Church Men's Club, Mr. A. J. Hulme, of Shrewsbury, gave a lecture entitled "Esperanto: a Growing Power." The lecturer spoke as to the idea of a common medium of expression between nations, and shortly described several attempts to meet this want. He dealt with the general adoption of Esperanto, its present sway, its literature, &c., and showed, by contrast with English, its logical construction. The speaker was warmly applauded, and the hope was expressed that he would soon repeat his visit.

**Plymouth.** — Those present at the last meeting, on the 1st November, were very few, owing to the bad weather and the municipal elections. The weekly meetings, however, are always well attended by learners. The idea as to meeting in each other's houses in turn is proving a great success, for already sixteen new members have been recruited by the group, and it is now trying the same method in Devonport, where Mr. Hawkyard has kindly undertaken the courses. The following members of the Plymouth Group give classes free of charge:—

MR. J. HAWKYARD, St. George's House, Devonport; MR. C. LEE, Y.M.C.A., Devonport; MR. D. SEARLE, 10, Hillpark crescent, Plymouth; MISS L. HOLT, 13, Connaught avenue, Plymouth. MR. J. THILL, 6, Barton-crescent, Plymouth.

**Leeds.** — This group has started classes, where instruction in Esperanto is given by the Gouin system, which the students much appreciate. The committee intends to arrange for a dinner, concerts and balls and also for an exhibition at the Northern Institute. Mr. F. L. G. Maréchal, B.A., gave addresses at Pudsey and Batley, and, as a consequence, a group has been started in both towns. The above mentioned classes are held every Thursday, from 7.30 to 9.30, as to which the secretary (Mr. J. H. Beaumont, 19, Leathley-road, Hunslet) will be pleased to give full information.

**London Club.** — On Friday, the 20th October, the club had the great pleasure to receive M. Bellan, Syndic of Paris, who kindly came on the invitation of the club. Mr. Harald Clegg made a short speech in Esperanto, saying:— "The members of the London Club

Londona Klubo deziras esprimi sian plezuregon esti honorigataj per vizito de urbestrara estro el Parizo, kaj ĝojas scii, ke li ankaŭ estas ano de la tutmonda frataro Esperantista, per kies helpo jam estas eble vidi ne nur interkonsenton inter Francujo kaj Anglujo sed ankaŭ interkonsenton internacian inter ĉiuj samideanoj." S-ro. Bellan respondis ke tio estas lia propra sento, kaj li esperas ke la "London County Council" faros por Esperanto tion kion li jam estas povinta fari por ĝi en Parizo. La ĝenerala kunveno de la klubo okazos lunden, la 22an de Januaro, sed pri tio plua informo estos trovebla en la januara numero de la Gazeto. Kurso por progresintaj studantoj estas aranĝita ĉe 14, Norfolk-street, ĉiun ĵaŭdon vespere. La kotizajo estas po 5s. por 10 lecionoj. Instruanto A. Schafer.

**Cambridge.**—En ĉi tiu universitata urbo nova societo estas fondita post kunsido ĉe D-ro. Cunningham. Gi estas titolita "Cambridge University and Town Esperanto Society." D-ro. Cunningham estas elektita Prezidanto kaj F.-ino. Stewart sekretariino. Kursoj okazas ĉiulunde kaj ĉiuvendrede. Por sciigoj, sin turnu al D-ro. Cunningham, 2, King's parade.

**Dover.**—Tre sukcesa kurso por sinjorinoj komenciĝis en Oktobro sub instruado de F.-ino. McNeill, fervora kaj lerta Esperantisto. La kursoj okazas ĉiumarde, anstataŭ ĵaŭde, ĉe la urba lernejo apud la Urbdomo, kie ĉiuj Esperantistoj plezuro akceptigas.

**Sale (Cheshire).**—Kiel sekvo de kunsido okazinta la 20an de Oktobro, oni decidis fondi grupon en Sale kiu aliĝos al la B.E.A. La anoj kunvenas, ĉe S.-ino. Walter, 11, Montague-road, unuj ĉiudimane je la  $3\frac{1}{2}$ a horo, kaj aliaj en la sama loko ĉiuvendrede je la 8a horo. La grupo dankas sian fondiĝon al la lertaj artikoloj pri Esperanto verkitaj de D-ro. O'Connor en la *Clarion* de Oktobro, kaj al la helpo de tiu sinjoro sendante al la sekretariino sciigojn pri personoj logantaj en Manchester, kiuj sin interesas pri la lingvo.

**Manchester.**—Tiu ĉi nova grupo jam kalkulas dudekon da membroj,

desire to express their great pleasure in being honoured by the visit of the chief Councillor of Paris, and are rejoiced to know that he also is a member of the world-wide Esperanto brotherhood, by whose aid we see not only friendly relations between France and England, but also international agreement between all friends of the cause." M. Bellan replied that such was also his own feeling, and that he hoped the London County Council would do for Esperanto that which he had been enabled to do for it in Paris. The general meeting of the club will be held on Monday, the 22nd January, but as to this, further information will be found in the January number of the Gazette. A class for advanced students has been arranged at 14, Norfolk-street, every Thursday evening. The subscription is 5s. for ten lessons. Instructor, A. Schafer.

**Cambridge.**—In this University town, after a meeting at the house of Dr. Cunningham, a new society has been founded. Its title is "Cambridge University and Town Esperanto Society." Dr. Cunningham was elected president, and Miss Stewart secretary. Classes are held on Mondays and Fridays. For information apply to Dr. Cunningham, 2, King's-parade.

**Dover.**—A very successful class for ladies commenced in October under the instruction of Miss McNeill, an earnest and clever Esperantist. The classes are held every Tuesday, instead of Thursday, at the Municipal School, near the Town Hall, where all Esperantists will be received with pleasure.

**Sale (Cheshire).**—As the consequence of a meeting held on the 20th October, it was decided to form a group in Sale which should affiliate to the B.E.A. The members meet at the house of Mrs. Walter, 11, Montague-road, some on Sundays at 3.30 p.m., and others at the same place on Fridays at 8 o'clock. The group owes its foundation to the able articles on Esperanto written by Dr. O'Connor in the *Clarion* during October, and to the help of that gentleman, who sent to the secretary information as to persons residing in Manchester who were interested in the language.

**Manchester.**—This new group already has a score of members, who

kiuj kunsidas por lernado ĉiumerkrede je 7.15a horo ĉe S-roj. Forsyth, Muzikvendistoj, 126, Deansgate, Manĉestro. La grupo, kiu ĵus aligis al la B.E.A., esperas baldaŭ plimultigi sian membraron. La sekretariino (S-rino. L. M. Walter, kiel supre) volonte respondos ĉiujn demandantojn pri la kursoj.

**Harrogate.**—En kunsido havita la 3an de Novembro nova grupo naskiĝis en Harrogate. La membroj kunsidas jaŭdojn kaj vendredojn, alterne, je 7.30a vespere, kiam oni lernas la gramatikon kaj ekzercojn, tralegas Esperantajn ĵurnalojn kaj korespondojn el fremdaj landoj kaj interbabiladas Esperante. Al tiuj, kiuj ĝin petas, la sekretario (S-ro. R. H. Swainson, 47, Chapel-street) plezure liveros plenajn sciigojn pri la klubo.

**Notice to Group Secretaries.**—As there may be some group secretaries who are a little disappointed at seeing their monthly reports altered, and in some cases shortened, the Editorial Committee wish to point out that close attention should be given to the following points when drawing up reports:—The length should not ordinarily exceed 100 words in English. The report should be given in both languages. Both should be typed (or written *very clearly*) on one side of paper only. Every report must be signed by secretary or other officer. Reports received later than the 15th of the month are liable to be shut out from the following issue. Poor style is tolerated, but bad grammar is not inserted, except by oversight.

## LITERATURA KONKURSO.

Ĉar ne estis sufice da konkurantoj por la Aŭgusta konkurso, la templimo estas plimalfruigita ĝis la fino de Oktobro. La gajninto estas S-ro. E. S. Campling (Esp. 9,318), 120, Ware-road, Hertford, Anglujo. Oni tuj sendos al li la premion, 10 ŝilingojn. El la aliaj provajoj ricevitaj kelkaj estas bonaj, kelkaj tamen estis malbonaj. Sed sen riproĉo ni diras tion ĉi; ĉar tiu, kiu verkas malbone almenaŭ faras la unuan pašon por fariĝi bona verkisto. Iam eble verkos bone tiu ĉi, neniam la neverkanto. Ni ne havas lokon por kritiki detale la provojn, sed ni resendos al kvin el la konkurintoj iliajn verketojn korektitajn. La kvin estos tiuj, kiuj la plej frue esprimos pošt-karte la deziron rehavi ilin. Cetere la artikolo "Don't" de tiu ĉi monato traktas sole pri eraroj faritaj de la konkurintoj.

**N.B.**—Students are advised that both Preliminary and Advanced Examinations are held periodically, full particulars of which can be obtained from the class-leaders, group or club secretaries, or direct from the secretary, British Esperanto Association, 13, Arundel-street, Strand, W.C.

